


EKE



esperanto

**Kunveno: merkredon la 15an de majo 2019a
je la 20.00 h. en “De Uitwijk”,
Generaal Pattonlaan 124, Eindhoven.
tel. 040-2450590.**

Flavaj Rakontoj

Jam antaŭe Rob prezentis al la klubo iujn el la nigraj aŭ alikoloraj rakontoj: enigmoj kiujn la grupo solvu per *ĉu*-demandoj. Ekzistas rakontoj nigraj, blankaj, verdaj, oraj, kaj ankoraŭ aliaj.

Ĉi-foje Rob prezentos al la ĉeestantoj kelkajn el la **flavaj rakontoj**. Tiuj rakontoj estas *sekaj* enigmoj pri *prerio kaj dezerto*. La skatoleto enhavas 50 kartojn (ni ne bezonos ĉiujn); sur ĉiu karto estas skribita unu enigmo. Sur la antaŭa flanko de la karto troviĝas mallonga teksto kaj bildo pri iu okazaĵo. Sur la dorsa flanko staras pli longa teksto kun klarigoj kiel tio povis okazi.

De tiuj enigmoj la “konanto” (Rob) laŭtlegas la etan tekston sur la antaŭa flanko, kaj montras la karton (kun la akompana bildo). Post tio la cetero de la grupo provas eltrovi kiel okazis tio kion ili ĵus aŭdis. Por tio ili starigas al la konanto demandojn (prefere mallongajn) kiuj estas respondeblaj per “jes” kaj “ne”.

